

n-ro 62

oktobro 1998

## Utilo de la anoncoj en La Merkato

En La Merkato 61 kaj per cirkulero al la anoncintoj mi enketis pri la rezulto de la anoncetoj kiuj jam de pluraj jaroj aperas en La Merkato. La reagoj estis malmultaj, sed tamen eblas fari kelkajn konkludojn:

La anoncoj apenaŭ liveras rezultojn. Kiel kialojn la respondintoj ĉefe mencias: la komerconto ne disponas pri la modernaj komunikiloj (fakso, reto); la lando estas politike kaj/aŭ ekonomie nestabila.

Pliaj reagoj estas bonvenaj.

RR

## Enhavo

Ĝenerala kunveno dum UK .....	3
Renkontiĝo kun ĉambro pri komerco kaj industrio .....	6
Laborkunveno IKEF-TAKE .....	7
Laborplano 2000 aprobata .....	8
Kongresaj fotoj .....	10
Komercaj petoj kaj proponoj .....	12
Novaj aliĝoj .....	14
Terminologio .....	16

---

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Seikō Yamasaki; D-ro Rainer Kurz, S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu!

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

IKEF-informoj en Interreto: <http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikef.htm>

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD). Kiu aliĝas meze de la jaro, pagu por 18 monatoj (900 aŭ 600 BEF). Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c  
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartnumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj). La IRK estu stampitaj de la eldonanta poŝtofiĉejo.

**Perantoj**:

Ĉeĥio: S-ro Vladislav **HASALA**, A. Dvořáka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/reg. 20-631-332507, retpoŝto vlada\_hasala(a)iol.cz

Ĉinio: S-ro **WANG** Tianyi, Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, rete komerco(a)public.xa.sn.cn

Francio: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon

---

(CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso -33(0)3.29.89.82.15

Germanio: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

Hungario: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapeŝt XIII

Italio: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Japanio: S-ro **YAMASAKI** Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

---

## Ĝenerala kunveno de IKEF dum la UK en Montpellier

Merkrede la 5-an de aŭgusto 1998 okazis la jara ĝenerala membrokunveno. Prezidanto Franz Josef Braun malfermis la kunsidon kaj salutis 48 ĉeestantojn, inter ili 22 membrojn. Apartan saluton ricevis profesoro Lee Chong kaj Grégoire Maertens, prezidintoj de UEA kaj membroj de IKEF.

S-ro Braun anoncis la viziton al la Ĉambro pri komerco kaj industrio de Montpellier, jaŭde je 14h30.

### Jen la taĝordo:

- 1- raporto de la prezidanto pri la agado de IKEF dum 1997
- 2- raporto de la financa konsilanto por la jaro 1997
- 3- decido pri la uzo de la financa profito de BEF 20.539
- 4- elektoj al la estraro
- 5- diskutado kaj akcepto de la laborplano 1998-2000
- 6- transiro al eŭro por librotenado ekde 1999
- 7- diversajoj

### 1. Raporto de la prezidanto pri la agado de IKEF dum 1997

En sia raporto la prezidanto, Franz J. Braun, reprenis la temojn prezentitajn en la numero 60 de "La Merkato", paĝoj 4, 5 kaj 8. Li notis la kreskon de la membraro, li substrekis la rimarkindan partoprenon por publikigi ekonomiajn artikolojn en "Monato". Li rememorigis la komercan projekton de s-ro Ruig el Nederlando. La prezidanto menciis la gravecon de terminara laboro, kiu pro manko da kunlaborantoj aktuale ne sufiĉe funkcias. Laŭ li, unu el la ĉefaj agadoj de ĉiu fakgrupo devas esti la terminara laboro, t.e. esperantigo de malnovaj kaj nove estiĝantaj nocioj. Li ripetis sian alvokon al la membraro pri kunlaboro kun s-ro Yamasaki en la terminara sekcio, kaj li petis UEA, ke tiu kunordigu la terminologian laboron de ĉiuj fakaj asocioj. Plia grava afero por li estas la gajno de entreprenistoj kiel simpatiantoj al Esperanto. Ili povus esti sponsoroj por alporti monon en la kasojn de Esperanto. Fine li informis pri la nova kunlaboro kun "TAKE", asocio por konstruistoj, laŭ la decido de la estraro okaze de komuna kunveno en Verdun en aprilo 98. Temas pri kunagado en samaj projektoj kaj evito de konkurenco.

---

## 2. Financa raporto de la financa konsilanto por la jaro 1997

La kasisto, Roland Rotsaert, legis la ciferojn de la kontoj prezentitaj en la paĝoj 6, 7 kaj 9 de la numero 60 de "La Merkato". Li klarigis la kialon de la pasintjara financa kromaĵo: temas pri malpli da elspezoj pro manko de agadoj. La prezidanto rimarkigis ke pli kaj pli da membroj estas profesiuloj, kiuj ne havas tempon por agadi favore al IKEF.

Agadraporto kaj financa raporto pri 1997 estis unuanime aprobitaj.

## 3. Decido pri la uzo de la financa profito de BEF 20.539

La financa profito de BEF 20.539 estos aldonita al la kapitalo.

## 4. Elekto al la estraro

D-ro Marco Picasso kaj Daniel König ne deziris pludaŭrigi sian mandaton. La ĉeestantaro dankis ilin pro la farita laboro. La prezidanto prezentis la kandidatiĝon s-ro Kurz el Stuttgart (Germanio) kaj s-ro Wang el Xi'an (Ĉinio), kiuj ne ĉeestis la U.K. F.J. Braun rekandidatiĝis.

22 membroj partoprenis la balotadon. F.X. Gilbert proponis elekti kiel prezidanto de IKEF, F.J. Braun: unuanime elektita li estis, krom sia sindeteno. La du novaj kandidatoj estis elektitaj kiel membroj de la estraro. Oni notis 1 sindetenon pri s-ro Wang.

## 5. Diskuto kaj akcepto de la laborplano 1998-2000

S-ro Braun prezentis la laborplanon 1998-2000 starigitan de la estraro kadre de la UEA-kampanjo 2000 por nova lingva ordo kaj publikigitan en "La Merkato" n-ro 61, paĝo 4. Ĝi estas listo de rekomendindaj celtrafaj agadoj, al kiuj la IKEF-membroj koncentriĝu. La laborplano estis unuanime aprobita.

---

## 6. Transiro al eŭro por librotenado ekde 1999

Tiu propono de la kasisto estis vigle diskutata. Post la klarigoj de la fakulo d-ro Michael Cwik la membroj kun plimulto aprobis ke la kontenado de IKEF jam ekde 1999 okazu en la nova eŭropa valuto eŭro.

## 7. Diversaĵoj

### Rilatoj kun eŭropaj instancoj

D-ro Cwik (IKEF-50) substrekis ke la strategio estas atentigi pri la lingva problemo (ĝenerale) kaj pripensigi pri planlingvo, kaj finfine poste prezenti la esperantan solvon. Do necesas subteni la terminaran laboron por la estonteco.

### Komercado

Prof. Lee el Koreio (IKEF-11) diris ke la disvastigo de Esperanto estas la rolo de UEA. Komerci pere de Esperanto estas montri ke Esperanto funkcias. En la reto de IKEF certe ekzistas "niĉaj" merkatoj!

S-ro Bronštejn el Rusio (KN-1152) demandis ĉu estos loko en Berlino kadre de la UK por vendo de varoj. Daniel König respondis ke la afero estos studata.

S-ro Bronštejn ankaŭ rimarkigis ke la identecŝildaro de IKEF povus esti pli efika kondiĉe ke la informoj estu pli detalaj. Roland Rotsaert respondis ke ĝi enhavas la precizigojn ricevitajn de la membroj.

S-ro Ebenau el Belgio (IKEF-63) atestis ke lia komerco disvolviĝis dank'al IKEF. Li aperigis anoncon en "Monato" kaj en "La Merkato" kaj ricevis kelkajn mendojn.

S-ro Könyves el Hungario (IKEF-77) diris plani kunlaboron kun la asocio TAKE.

S-ro Sossois el Belgio (IKEF-101) parolis pri siaj kontaktoj kun la esperantistaj juristoj.

### Projekto en turisma kampo

---

D-ro Cwik el Belgio (IKEF-50) prezentis sian proponon koncerne la mediteranean kaj arabajn regionojn. Ĝi necesas surloke homojn kapablajn instrui Esperanton al la deĵorantoj de la hotelistoj por doni al ili informojn pri la lokaj kulturoj. Li demandis ĉu IKEF pretas kaj povas helpi al li por solvi tiun defion.

S-ino Witdoeck el Belgio proponis renkontiĝon kun d-ro Cwik por transdoni al li libron pri hotelmetioj.

D-ro Polerani indikis ke ekzistas "terminologia gvidlibro" por helpi al tiuj, kiuj preparas terminologian laboron.

Intereseĝan esperantlingvan libron menciis profesoro Lee: "Vastas la mondo, multas la laboro" de Kim Woo-Choong, fondinto kaj prezidanto de la korea kompanio Daewoo. Li emfazis la valoron de ĉi-tiu libro kaj rekomendis al la membroj, ke ili petu de sialanda Daewoo-filion la libron, por ke la kompanio vere ekkonu la ekzistadon kaj la intereson de la esperantistoj.

Je la 14a horo necesis liberigi la lokon. La prezidanto Franz J. Braun dankis la ĉeestantaron pro ĝia dinamika partopreno, kaj invitis al denova partopreno en Berlino, venontan jaron.

Protokolis F.X. Gilbert

---

### Renkontiĝo kun ĉambro pri komerco kaj industrio de Montpellier

24 personoj grupiĝis jaŭde la 6-an de aŭgusto 1998 por renkonti deĵoranton de la komercoĉambro de Montpellier kaj ricevi informojn pri la ekonomia vivo de tiu sudfranca regiono Languedoc-Roussillon.

La direktoro pri komunikado, s-ro Troussel, akceptis la grupon je la nomo de la ĝenerala direktoro, kiu feris. Ni komence vizitis la sidejon, kiu nomiĝas "hotel Saint Côme". Tiu domo estis konstruita en 1752 dank'al financaj rimedoj donitaj de profesoro François de Lapeyronie, ĉef-kirurgo en la hospitalo "Hotel Dieu" en Parizo. Li estis la kreanto de la loka medicina akademio kaj en ronda salonego de tiu domo okazis la unua leciono pri anatomio (en tiu epoko, oni ne aŭdacis diri "dissekcado").

Antaŭ prezentado de okminuta videobendo pri turismo kaj ekonomio de la sektoro, prezidanto F.J. Braun prezentis IKEF kaj dankis pro la akcepto. Poste, s-ro Troussel klarigis la funkciadon de ĉambroj pri komerco kaj industrio en Francio, kaj pli precize la rolon de tiu de Montpellier en la industria, komerca kaj turisma kampoj. Deĵorantino afable proponis trinkaĵojn al la partoprenantoj.

#### Kelkaj ciferoj:

Entreprenejoj entute 18.525 (el tiuj nur 1164 havas pli ol 10 dungitojn), dispartigitaj en 1365 por industrio (7%), 1353 por konstruado (7%), 6986 por servoj (37%), 8821 por komerco (49%). Dungitoj: en industrio: 2%, en konstruado: 11%, en servoj: 59%, en komerco: 28%.

Montpellier estas la krucvojo inter la suda kaj la norda Eŭropo, inter Italio kaj Hispanio. La ĉambro ambicias kapti la transiron de la varoj kaj de la homoj. Ĝi kreis "Eurogare", kiu estas la renkontejo de la fervojo, de la aŭtoŝoseoj kaj de la flugvojo. Pro tio, ĝi pligrandigis la flughavenon de Montpellier pri kiu ĝi respondecas. Tamen la kvoto de senlaboreco estas alta en la regiono Languedoc-Roussillon: 17,1%.

Fine, F.J. Braun dankis s-ron Moon pro la profesia traduko kaj s-ron Gilbert pro la organizo de la renkontiĝo. Li transdonis

---

al s-ro Troussel ekonomiajn tradukaĵojn de IKEF kaj dokumentojn de la ĉambro pri komerco kaj industrio de Bar le Duc, kiu uzis la lingvon Esperanto en diversaj eldonaĵoj.

Noto: vi povos ricevi precizajn informojn pri la funkciado de komercoĉambroj en Francio, petante ilin de s-ro F.X.Gilbert, 33 rue Louvière, FR-55190 Void-Vacon, Francio, aŭ fakse 33-(0)329.89.82.15. Protokolis F.X. Gilbert

#### Laborkunveno inter IKEF kaj TAKE dum UK

La 6-an de aŭgusto 1998, vespere, kunvenis:

por TAKE: Ed. Ludwig, A. Grossmann

por IKEF: F.J. Braun, R. Rotsaert, F.X. Gilbert, D. König

1. Oni konstatis ke neniu reago alvenis post la unua komuna paŝo, nome la samtempa sendo de la bultenoj de ambaŭ asocioj.

2. Oni ekzamenis la eblecon por plialtigi la nombron de la kotizantoj/abonantoj en ambaŭ asocioj.

Post interŝanĝo de ciferoj pri la eldonado de la revuoj La Merkato kaj La Domo, oni konkludis ke estas proksimume 50 komunaj aliĝantoj al la du asocioj. La aktuala kotizo por anoj el landoj UEA-kategorio A ("riĉa") estas ĉe IKEF 100 FRF kaj ĉe TAKE 102 FRF.

Do, membro/kotizanto/abonanto de ambaŭ asocioj aktuale pagas sume 220 FRF. Se oni volas gajni pli da komunaj membroj/abonantoj, oni devas rabati tiun sumon. Tiukaze ankaŭ la nunaj komunaj membroj/abonantoj prave pretendas la saman rabaton. Oni decidis jenan tarifon por komunaj membroj (ĝisnunaj kaj novaj):

Landoj kategorio A ("riĉaj") 180 FRF (estonte: 30 EUR)

Landoj kategorio B ("malriĉaj") 120 FRF (estonte: 20 EUR)

De la 180 FRF ricevos IKEF 80 kaj TAKE 100.

Tio validas nur por komunaj membroj/abonantoj. Por membroj de nur unu asocio validas la ĝisnunaj individuaj tarifoj.

---

3. En oktobro, oni redaktu apartan flugfolion por paroli pri la samtempa sendo de la du bultenoj en julio, kaj prezenti la novajn komunajn prezojn (en FRF kaj en EUR) sur la bazo 15,00 EUR = 100 FRF.

4. Oni pripensu la eblecon komune lui lokon en Berlino por lokigi la esperantistajn komercistojn. F.J. Braun enketos por ekscii ĉu surloke luebla loko ekzistas ene aŭ tute apude de la kongresejo.

5. Oni menciis la dosieron transdonitan de s-ino Despiney pri projekto favore al la franclingvaj landoj en Afriko. F.X. Gilbert studos la aferon.

Fine: Oni notas ke s-ro André Mertens el Belgio (IKEF 252) disponas pri tempo por helpi al IKEF.

FXG

IKEF-LABORPLANO 1998-2000, kadre de UEA-Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo, aprobita dum la Ĝenerala kunveno de IKEF			
cif. UEA	speco de agado	responsulo	
		↓ prioritato!	
1.4.1	Kampanjo "por pli vasta verdujo" Pligrandigi la membraron de IKEF a) Difino de celgrupoj varbotaj Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko b) Difino de membronombro atinginda 200 membroj ĝis fino de 2000 - moto: Ĉiu membro varbu novan membron - sendigi varbleteron tra UEA al Ĉiuj UEA-membroj, kies profesio rilatas al nia fako c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio	estraro	1
		estraro	1
		Ĉiuj m.	1
		prez. FJB	1
		prez. FJB	2
1.4.2	Celtrafaj IKEF-aj agadoj a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj e) Terminara laboro f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj	prez. FJB	1
		koncernataj membroj	2
		Ĉiuj membroj	1
		Ĉiuj membroj	1
		Yamasaki	1
		membroj k.	1
		ĵurnalisma talento	1
2.1.1	Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retroŝto c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako)	B. Holm	1
		Ĉiuj membroj	1
		redaktoro RR	2
		Yamasaki S.	3

3.5	Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio b) Naciaj ministerioj pri ekonomio c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj  d) Komercaj Ĉambroj	M. Cwik prez. FJB sciencisto j pri ekonomio membroj kun kontaktoj al K.Ĉ.	2
			3
			2
			2

---

### Anoncitaj aranĝoj

**Budapeŝto, Hungario**, 11-18 oktobro 1998: TEJO-seminario 'Lingvaj rajtoj - lingvopolitiko'. Subtenata de la Konsilio de Eŭropo; vojaĝkostoj repageblaj. Informoj: Lariko Golden, Damjanich u. 1/c.I.8, H-8200 VESPREM, Hungario; fakso +36-1-2828885, rete <golden(a)isis.elte.hu>.

**Prago, Ĉeĥio**, 13-15 novembro 1998: KAEST '98 - Kolokvo pri aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. Organizanto/informejo: KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 DOBRICHOVICE (Prago), fakso +420-2-9912126, rete <chrde(a)telecom.cz>.

### Eŭropaj gvidlinioj pri financa administrado

Komuniko, aprobita de la Eŭropa Komisiono je 22 februaro 1998, haveblas tra Interreto je <http://europa.eu.int/dg15> en PDF-formato (ĉ. 330 Kb). Kvankam laŭ informilo (Eŭropo sen Limoj, marto 1998) la teksto ekzistas en ĉiuj lingvoj de la EU, mi nur sukcesis lokigi francan, anglan kaj eble germanan version.  
RR

### Tutmondaj Metiistoj (Artisans du Monde)

La federacio 'Tutmondaj Metiistoj' havas 60 vendejojn en Francio kaj estas ano de reto 'NEWS', nombranta 2500 asociojn en 13 eŭropaj landoj. Jam de 20 jaroj ĝi celas vendi nutraĵojn kaj manfaritajn produktojn el Afrika, Azio kaj Latina Ameriko je decaj kondiĉoj. Por pligrandigi sian skipon TM serĉas personojn kun kompetenteco je vendado, merkato, librotenado kaj instruado. Adreso: Artisans du Monde, 67 av. République, F-75011 PARIS. Fakso 01 49 29 95 25.

### Interesaj interretpaĝoj

Kiu (iom) konas la anglan lingvon trovos utilajn informojn je jenaj adresoj:

**www.iie.com** (Institute for International Economics, Instituto

---

por Internacia Ekonomiko): IIE estas usona organizo, fondita kun helpo de Marshall- kaj Ford-fondusoj. En ĝiaj retpaĝoj troviĝas fakaj tekstoj pri diversaj aktualaj ekonomiaj temoj.

**www.travlang.com** : Travlang estas usona kompanio kiu produktas aŭtomatajn traduksistemojn. Tamen, ĝi proponas diversajn senpagajn tradukeblecojn en multaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto.

---

(fotoj UK)

---

(fotoj UK2)



---

## Komercaj petoj kaj proponoj

### **Internacie**

KLAS-1-sigelo de MUZIKOM aperas kiel garantio de aŭtentikeco sur kompaktdiskoj kaj diversaj aliaj varoj fabrikataj sub licencoj obtenitaj de niaj klientoj. Oni vizitu butikojn en sia loka urbo de tempo al tempo por konstati ĉu la sigelo troviĝas sur specifitaj varoj. Pago je livero de la raportoj. Adreso: MUZIKOM - SIGELO Corp., 24a et., suite 2400, 515 Madison Ave., New York, NY 10022, Usono; fakso (212) 758 4332, rete <gardrajt(a)aol.com>.

### **Bjlorusio**

(kompletigo kaj korekto de anonco kiu aperis en LM59)

Muntado de teĥnologiaj instalaĵoj, tublinioj, metalkonstruoj; produktado de nenormigitaj instalaĵoj kaj metalkonstruoj; fundamentaj riparoj de instalaĵoj de ĥemiaj kaj naftofabrikejoj kaj industriaj entreprenoj. S-ro Genadzi Kurgun, BSPM, Pr-t J. Kupaly 54-64, BY-230010 GRODNO, oficeja fakso +375 152 442073 telefono 444260, privata telefono 263015.

### **Brazilo**

Ĉu vi deziras koni iun grandan negocon kiu povus havigi al vi pli da mono, sekureco kaj libera tempo (per 'Network Marketing') ? Skribu al s-ro Wellington GARCIA, Av. N.S. Da Penha 531 - Apto. 201 - Penha, Rio de Janeiro - RJ CEP 21070-390, Brazilo.

### **Bulgario**

S-ro Lalo Stojko NIKOV (IKEF 266, v. informojn ĉe novaj membroj) proponas diversspecan komercon, helpen en partopreno de grava komerca foiro de Plovdiv (dufoje jare) kaj diversaj aranĝoj en Sofio.

### **Italio**

PERLANERA snc serĉas importistojn de itale rostita kafo

'espresso', krome por negocado de malgrandaj kafaperatoj, taŭgaj ankaŭ por familia uzado, utiligantaj unudozajn oblatporciojn de muelita rostita kafo (angle: minipods, itale: cialde). Adreso: via Piccardi, I-34141 TRIESTE, telefono +39 040 390580 fakso +39 40 638206. (transdonis G. Valente, IKEF 158)

### **Turkio**

Volas eksporti paperon por kopimaŝinoj, glubandon (angle: tape), etajn oficejajn materialojn (angle: stationery) al ekssovetiaj landoj kaj serĉas importantojn kaj kunlaborantojn tie. Ankaŭ informas pri turkaj varoj. SES-YAY Ltd. Sti, S-ro Kemal Orouche, P.O. Box 161, TR-44201 MALATYA; fakso 90-422-3264322.

### **Korespondpeto**

S-ino Romanova Valentina (°1939, pensiulino, eks-ekonomik-istino) ŝatus korespondi kun geesperantistoj de ĉiuj aĝoj, tutmonde. Deziras ekspozicii siajn brodaĵojn eksterlande. Adreso: ul. Vorovskogo 11-69, RUS-183038 MURMANSK, Ruslando; telefono (815-2)45-93-35.

### **Eŭropa Unio**

\* La oficiala gazeto de la EU ĉiutage konsulteblas tra interreto en 11 lingvoj je <http://europa.eu/int/eur-lex>. Tie iom post iom ankaŭ legeblas eŭropa leĝaro.

\* En EU ekzistas 233 'eŭro-info-centroj' (EIC) kiuj al entreprenoj havigas ĉiuspecaj informoj pri EU. Aktuala listo de la EIC-reto haveblas je <central.admin.eic(a)fcis.cec.eu.int>.

### **COBIT-ISACA: gvidlinioj por informadiko**

ISACA (mallongigo de angla 'Information Systems Audit and Control Association & Foundation') estas usona asocio kun lokaj grupoj en multaj landoj, kiu ligas profesiulojn pri manaĝado kaj kontrolo de informadikaj (komputilaj) sistemoj.

---

Ĝi ellaboris kontrolnormojn 'COBIT' (Control Objectives for Information and related Technology, kontrolceloj por informadika kaj rilata teknologio).

Esperante ke tiel la COBIT-normoj estos tutmonde akceptataj, ISACA tra interreto libere disponigas ilin al interesitoj. Informoj troveblas je <http://www.isaca.org/> (ĉio en angla lingvo).

RR

#### Perdita membro ?

Atentemaj legantoj rimarkos ke en la listo de novaj membroj je la sekva paĝo mankas numero 262. Mi ne konas la kialon. Se iu persono aliĝis lastatempe, sed ne trovas sian nomon en la listo, la prizorganto de la adresaro eble erare denove eligis lin. Li/ŝi reagu!

RR

---

#### Novaj aliĝoj

260. S-ro Eric COLLIGNON, Ausias March 46-A-1r-1a, E-08205 SABADELL, Hispanio

261. S-ro Jacob NORDFALK - Nordfalken, Præstehusene 29, DK-2620 ALBERTSLUND, Danlando, <nordfalk(a)alf.nbi.dk>

263. S-ro François BARTSCH, tradukisto, Alpe du Jocou', F-38930 LALLEY, Francio, °1957, tel. 04 76 34 75 27

264. S-ro Gérard CLAËS - direktoro de 'A6-MédiaGuide', 42 rue Paul Claudel, F-91000 EVRY, Francio, °1952, tel. 01 60 77 72 06, fakso 01 60 79 49 87 rete <gerard.claes(a)hol.fr>; serĉas kunlaboron kun ĉinaj entreprenoj; komencanta esperantisto

265. S-ro Zenonas SABALYS, prezidanto de banko 'ŠIAULIU BANKAS', Tilžės st. 149, LT-5400 ŠIAULIAI, Litovio, tel. (370 1) 522 117, fakso (370 1) 430 774, reto <info(a)sb.lt>

266. S-ro Lalo Stojkov NIKOV, p.k. 497, BG-1000 SOFIA, Bulgario, °1943, tel. 318840, fakso (per poŝtoŝicejo, aldonu nomon) 835180; perado en bulgaraj foiroj; komerco en ne rapide pereebaj manĝvaroj

267. S-ro Olivier MOREAU, respondeculo pri administrado de vendado, 48 rue Raffet, F-75016 PARIS, Francio, °1964, rete <omoreau(a)esperanto.org>

268. S-ro Patrick SEGUR, telekomunikisto (banka informadiko/telekomunikado), 74 rue Raymonard, F-75016 PARIS, Francio, °1950, rete <patrick.segur(a)infonie.fr>

269. S-ino Viŝnja BRANKOVIĈ, Via Leghissa 6, I-34131 TRIESTE, Italio

270. S-ro Etsuo Miyoshi, 440 Shirotori-cho, Kagawa-ken 769-2702, Japanio

271. S-ino Riitta HÄMÄLÄINEN, ĉefino pri merkato de ARCTINAR Ltd., Koskelantie 31 B 22, FI-00610 HELSINKI, Finnlando (konstruado kaj vendo de saŭnoj, vaporsaŭnoj, ligno kaj saŭnorilatoj produktoj)

---

272. S-ro Bruno DALLA POZZA - Universalaj Geviroj, P.O.Box 607 CK, SAIPAN MP 96950, Usono, °1928, rete dobruno(a)itecnmi.com

273. S-ro Jean RAWYLER, C.P. 30, CH-1226 THÔNEX, Svislando, °1944, tel. + fakso (+41)22 348.78.54; reto ariats(a)compuserve.com

#### Novaj (ret)adreso

4. Franz Josef Braun: <f.j.braun(a)t-online.de>; telefono 07223-942064; fakso 07223-942065

27. Werner Bormann, Neumühlen 37/414, D-22763 HAMBURG, tel. 040-39194-414, fakso 040-39194-992

54. Daniel König: <daniel.koenig(a)chun.de>

171. P. Chrdle: <chrdle(a)telecom.cz>

#### Identec&ild

Nomo: Riitta Hämäläinen  
Membronumero: 270  
Profesio: entreprenisto  
Nomo de firmao: Arctinar Ltd.  
Adreso: Koskelantie 31 B, FIN-00610 Helsinki, Finnlando  
Telefono: +358-9-728 92 990  
Fakso: +358-9-777 33 11  
Retposxto: arctinar(a)dlc.fi  
TTT-pagxoj: www.dlc.fi/^^ arctinar (ankoraŭ konstruataj)

Proponataj servoj: vendado de saŭnejoj, saŭndometoj, saŭnofornoj kaj -ŝtonoj, vaporigiloj kaj vaporejoj, ligno, saŭno

Aldonaj produktoj: tekstilaĵoj, aromoj, flegproduktoj, lignaj iloj kaj ujoj, konsulta helpo por saŭnokonstruado

Lingvaj kapabloj: esperanto, angla, sveda, germana, franca, hispana, japana, rusa (nur iom), finna

---

#### Mallonga historio de la komerca ĉambro de Montpellier

Origine, francaj komercaj ĉambroj devis perkoresponde informi la konsilantaron de la reĝo. Iuj ĉambroj rapide ekaktivis plurterene: servoj, havenoj, magazenoj, instruado, komercaj borsoj... La komerca ĉambro de Montpellier estis kreita per reĝa edikto de 15 januaro 1704. La franca revolucio interrompis la funkciadon, sed en 1801-1802 22 ĉambroj renaskiĝis, sub Ĝenerala Konsilio de Komerco. Leĝo de 5 aprilo 1898 donis al la ĉambroj statuson de finance aŭtonoma publika instanco.

(rr, laŭ informiloj de kĉ)

---

## Terminologio

### Nova kunlaboranto en la terminologia sekcio

S-ro Josef MENDL, kiu antaŭ nelonge faris terminareton kun librotenaj terminoj, kunlaboros en la terminologia sekcio de IKEF, kvankam ne estante membro. Lia adreso: Pod stadionem 1136, CZ-399 01 MILEVSKO, Ĉeĥio.

### Gazeteraj komunikoj de UEA

#### (1) Esperanto en Internacia Terminologiscienca konferenco

La aŭstro Eugen Wüster (1898-1977) estis ne nur unu el la fondintoj de esperantologio kaj brila interlingvisto, kies verkoj (i.a. Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana) daŭre estas tre gravaj por esperantologoj kaj vortaristoj. Li estas ankaŭ la fondinto de la terminologia scienco kaj li impulsis diversajn aliajn sciencobranĉojn. Omaĝe al la 100-a datreveno de lia naskiĝo okazis en Vieno, de la 24-a ĝis la 26-a de aŭgusto, la duobla konferenco "Faka komunikado kaj scio-transdono -- ProCom'98".

Unu parto de la konferenco traktis la kadran temon "Faka komunikado, terminologio kaj planlingvoj". La alia estis la 4-a simpozio de Infoterm (Internacia Informcentro pri Terminologio, ligita al Unesko kaj kun sidejo en Vieno). Kun ĝi UEA havas tre bonajn kontaktojn ekde la 80-aj jaroj, dank'al la agado de Terminologia Esperanto-Centro (TEC). Inter la organizantoj de la konferenco estis la Internacia Esperanto-Muzeo Wien (IEMW); inter la oficialaj subtenantoj UEA kaj la germana Societo pri Interlingvistiko, kiun prezidas Detlev Blanke <blanke.gil(a)berlin.snafu.de>.

Esperanto ludis gravan rolon en la konferenco, kiun partoprenis ĉ. 120 terminologoj el 26 landoj, inter ili tre renomaj fakuloj. La direktoro de IEMW, Herbert Mayer, apartenis al la organiza komitato, Detlev Blanke al la programkomisiono. La oficialaj lingvoj estis la angla (kiu dominis), germana, franca kaj Esperanto. Unu el la ses

plenkunsidaj enkondukaj prelegoj pri la vivo kaj verko de Wüster estis tiu de Blanke, "Terminologio kaj planlingvoj". Li prezentis i.a. la aktualan situacion de Esperanto kiel faklingvo, la priplanlingvan verkon de Wüster kaj ties impulsojn al la terminologia scienco. La enkondukaj prelegoj, i.a. la 35-paĝa de Blanke, jam aperis en 300-paĝa libro dediĉita al la vivo kaj verko de Wüster.

Blanke ankaŭ organizis unu el la 4 sekcioj kun la kadra temo "Terminologia scienco kaj planlingvoj". En ĝi Wera Blanke resumis la historion kaj situacion de terminologiaj aktivecoj en Esperanto. Pri la Enciklopedia Vortaro (EV) traktis Otto Back (latinaj kaj grekaj nomoj en EV), Sabine Fiedler (frazologio en EV) kaj Wim De Smet (konceptoj pri nomoj de plantoj kaj bestoj en EV kompare kun tiuj ĉe aliaj terminologoj). Staton kaj sperton de du grandaj multlingvaj leksikografiaj entreprenoj, kun grava pozicio de Esperanto, prezentis Heinz Hoffmann (interlingvaj nocio-problemoj ĉe fervoj-rilataj terminoj) kaj Karl-Hermann Simon (principoj de la forstosciencia vortaro Lexicon silvestre). Herbert Mayer traktis pri la planlingva postlasaĵo de Wüster en IEMW. La prelegoj okazis en la germana, nur tiu de De Smet en Esperanto. Iliaj ampleksaj tekstoj aperos en la aktoj de la konferenco.

Ankaŭ en ekspozicio pri Wüster, prezentita en la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj preparita de Infoterm kaj IEMW, la planlingva verko de Eugen Wüster estis bone atentita.

#### (2) UEA en kunsido de teknika komitato de ISO

Ekde 1990 UEA havas oficialan kunlaboran statuson en kategorio A kun la Teknika Komitato TC 37 de Internacia Organizo por Normigado (ISO). En tiu kategorio estas nur 18 internaciaj organizoj, i.a. Unesko, Monda Organizo por Sano kaj Europa Komisiono.

Kiel diras ĝia nomo, "Terminologio (Principoj kaj kunordigo)", la celo de la komitato TC 37 estas krei bazon por la terminologia laboro de la aliaj komitatoj de ISO, kiuj okupiĝas pri normigado sur specialaj kampoj de industrio,

---

publika administrado, scienco, ktp. Flanke de UEA la rilatojn kun ĝi prizorgas Terminologia Esperanto-Centro, kiu laste pretigis la Esperanto-eldonon de "Terminologia gvidilo". Ĝia autorino, Heidi Suonuuti, dum multaj jaroj estis prezidanto de TC 37.

La 14-an de aŭgusto la Teknika Komitato TC 37 kunsidis en Stokholmo. Ĉeestis 30 membroj kaj 9 observantoj. Kiel observanto de UEA partoprenis Roland Lindblom. En la kunsido oni prezentis i.a. la programon "Multlingva Informsocio" de Unesko, kiu mencias la ekziston de ĉiuspecaj fakaj terminaroj kiel kondiĉon por la pluvivo de malgrandaj lingvoj.

---

### Espéranto et commerce

En numeroj 498-500 de la revuo Franca Esperantisto aperis historio de la E-movado en Francio dum 1898-1998. El ĝi mi citas jenan tekston. Ĉu iu scias pli pri la menciita asocio?

"En 1923 fondiĝis "Espéranto et commerce" (Esperanto kaj Komerco), kies celo estis helpi al disvastigo de la franca ekonomio. La Foiro de Parizo kaj la Komerca Ĉambro de Parizo estis kunfondintoj; la unua prezidanto estis Nuyts [neniu informo trovita pri li, laŭ nomo verŝajne de belga deveno], poste André Baudet [1876-1940, inĝeniero-industriisto]. La asocio verkis vortaron de teknikaj terminoj, kreis bultenon en 1928, organizis kursojn..."

RR

(anoncoj)

